

SKIZO DE LA HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN SLOVAKIO

Kompilis

EDUARD V. TVAROŽEK

Teksto de prelego okazinta en Brno 1971-06-12/13 kadre de la konferenco pri la historio de la movado en niaj landoj.

Volante paroli pri la Esperanto-movado en Slovakio, ni devas antaŭ ĉio konsideri la fakton, ke ĝis la ekesto de la Ĉeĥoslovaka respubliko en 1918 la du partoj de ĈSR havis malsaman historion, ĉiu el ili apartenante al alia, post 1848 konsiderinde direrencan evoluvojon havanta ĉefparto de la Aŭstro-hungara monarĥo. Estas do komprenebla afero, ke la E-movado sur la teritorio de la nuna Slovakio nature havas komunajn fontojn kaj radikojn kun la E-movado en Hungario kaj ĝis 1918 estas ĝia nedisigebla, organika parto. Kaj se la E-movado en Slovakio interesas nin el la vidpunkto de niaj tagoj – alivorte dirite, kiel E-movado inter Slovakoj, do ĝi logike montriĝas kiel dependa de la apero de slovak-lingva lernolibro, kvankam oni povas supozi, ke kleraj Slovakoj-unuopuloj, konantaj bone la hungaran lingvon, povis konatiĝi kaj do ankaŭ konatiĝis kun esperantismo pere de la hungarlingvaj lernolibroj kaj periodaĵoj, ankaŭ pli frue, sed certe ankaŭ helpe de la tiamaj viglaj kontaktoj de Slovakoj kun Ĉeĥoj, kiuj ja havis lernolibron jam en 1890, do 8 jarojn pli frue ol Hungaroj, kaj la unuan Esperanto-klubon – tiun de Brno – jam en 1901.

Mi menci la komencojn de nia afero en Hungario¹⁾: la unua hungara esperantisto estis D-ro Gabrielo B á l i n t , universitata profesoro de uralaj-altajaj lingvoj en Kolozsvár (nun Cluj en Rumanio), kiun varbis por Esperanto verŝajne ankoraŭ Couturat. D-ro Bálint eldonis litografie la regulojn de E. kaj havis en 1897 kurson (varŝajne en Kolozsvár), kiun partoprenis ankaŭ juna ĵurnalisto Ábel B a r a b á s . Tiu ĉu fervorulo jam la sekvan jaron, en 1898, eldonis lernolibron – la unuan en Hungario!

La eldono de la lernolibro elvokis aron da mokaj kaj atakaj artikoloj en la preso, kaj la lernolibron aĉetis nur malmultaj; inter ili estis Paŭlo L e n g y e l , presisto el la urbeto Szekszárd, kiu fariĝis fervora esperantisto, transprenis en 1900 la eldonadon kaj presadon de "lingvo internacia" kaj daŭrigis ĝian presadon ankaŭ en Prizo, kien li elmigris en 1904 kaj fondis kaj direktis tie "Presan Esp-istan Societon".

La unua Esperanto-grupo ekfunkciis en la jaro 1901 en Budapeŝt; ĝia prezidanto estis Jozefo M i l e t z kaj en ĝi eklaboris ankaŭ Aŭgusto M a r i c h . En 1903 aperis la dua gramatiko, verko de Lengyel, Schwörer kaj Miletz, kaj en la sama jaro fondiĝis Unuiĝo de hungaraj esperantistoj; ĝia prezidanto estis Jozefo Miletz. En 1904 la Unuiĝo komencis eldonadi multobligitan gazeton "Esperantisto", kiu ekde la 2-a n-ro nomiĝis "Hungara esperantisto".

En 1905 komencas fervore aktivi Aŭgusto Marich. En tiu ĉi jaro li fondis "Hungaran Esperantistan Societon" kaj en majo samjara aperis (kun la subteno de Ludoviko Makay en Budapeŝt) la unua presita propaganda gazeto nomata "Esperento", kiu post du jaroj (do en 1907) estis alinomita je "La Verda Standardo". Redaktis ĝin Marich.

En tiu tempo estis E-grupoj aŭ rondoj en Budapeŝt, Versec (Vrŝac?), Szeged, Debrecen kaj Kolozsvár. Por la propagando tiutempe tre bone efikis la vizito de kelkaj eminentaj eksterlandaj esp-istoj en Hungarlando.

La jaro 1907 signifas la kreon de kondiĉoj por ekesto de esperantismo inter Slovakoj. En tiu ĉi jaro aperis en Turĉianský Svätý Martin la slovaklingva traduko de la zamenhofa "Fundamento de Esperanto". Eldonis ĝin D-ro Adalberto (Albert) Ŝkarvan (1869-1926) kunlabore kun rusa esp-isto N. P. Efstifejev. La slovakaj presoj komentis ĝian aperon en kelkaj artikoloj, sed plejparte nefavore. Tio ja estis tute komprenebla afero en la tiamaj komplikaj soci-politikaj cirkonstancoj en Slovakio.

Kompreneble, en tia situacio, kia tiam regis en Slovakio, la apero de lernolibro ankoraŭ ne signifis ekeston de movado; tiu tamen ekzistis, sed inter ia hungarlingva loĝantaro; kompreneble, oni povas tute prave supozis, ke parte aktivis aŭ almenaŭ partoprenis en ĝi ankaŭ Slovakoj.

En rilato kun Esperanto ne estas eble ne menciigi ĝian uzon favore al la tiam kruele subpremata slovakaj nacio.

Dum la UK en Cambridge en 1907 D-ro Adalberto Ŝkarvan, pioniro de Esperanto en Slovakio kaj eldoninto ĉe la zamenhofa Fundamento en la slovakaj lingvoj, elpaŝis publike kaj sur tiu ĉi internacia forumo atentigis pri la malbona sorto de la slovakaj nacio kaj altiris la atenton de la mondo al la situacio de la nemadjaraj nacioj kaj naciaj malplimultoj en la tiam Hungarioj, suferantaj plej senkompatan persekutadon sennaciadon kaj madjarigadon.

La dua, similtendenca ago estis la eldono de la broŝuro "Slovakoj kaj Magiaroj. Kelkaj vortoj pri slovakaj suferado en Hungario." de H. K. Bouška, aperinta en majo 1908 en Esperanto kaj pluaj 5 lingvoj.

La elpaŝo de D-ro Ŝkarvan kaj la broŝuro de Bouška havis la saman celon kaj sukcesis atingi la deziratan rezulton: atentigi, ke en la fama liberecbatalo kontraŭ Aŭstrio la hungara parto de la monarĥio fakte elbatalis por si la rajton subpremi laŭvole la nemadjaran loĝantaron en siaj limoj. Kaj Ŝkarvan kaj Bouška apelaciis al la konscienco de la mondo, ke ĝi ne permesu tion en la 20-a jarcento.

En "la Verda Standardo" el oktobro 1908 la redaktoro Augusto Marich skribas en la ĉefartikolo: En multe da urboj de Hungarujo enradikiĝis jam Esperanto. Tiel post Budapeŝt nelonge (sekvas la nomoj de 24 urboj, inter ili:) Pozsony (= Bratislava), Komarom (= Komárno), Szenicz (= Senica), Kraszna (= Krasno?), Besztercze (= Bystrica)... fariĝis hungaraj (komprenu: hungarlandaj) esperantemaj urboj..."

En la n-ro el januaro 1909 de LVS en la Hungara kroniko oni raportas pri la fondo de tutlanda hungara esperantista asocio "La Verda Standardo", kaj pri ĝiaj 10 grupoj, inter kiuj oni mencias Nyitra (= Nitra) (studenta grupo, estro J. Luczenbacher), Trencsén (= Trenčín), estro A(rpád) Motko).

La sama n-ro raportas pri publika propropaganda prelego (en la originalo: legaĵo!) de A. Motko kaj pri la kursoj gvidataj de la du suprenomitaj, kiel ankaŭ pri ia propagandaj artikoloj en la hungarlanda presoj, inter aliaj en Vág-völgyi Lap (= Vag-vala gazeto) kaj Trencsényi Lapok (= La gazeto de Trenčín).

En februaro 1909 aperas la unuaj mencioj pri sukcesoj en la hungaraj urboj Vác, Temesvár (nun Timisoara, en Rumanio), Debrecen, kaj la unua signalo pri la esperantista vivo en Pozsony (Bratislava), precipe dank' al la publikaj propagandaj prelegoj de A. Marich.

En la marta n-ro de 1909 estas denove laŭdo pri la fervora agado de A. Motko en Trenčín (kurso kaj dua publika propaganda parolado), pri organizaj laboroj en Selmeczbánya (= Banská Štiavnica), kie mem la urbestro Kolomano Horváth kaj gimnazia profesoro G. Boleman estras la movadon.

En Bratislava okazas la 21-an kaj 22-an de marto 1909 du publikaj propagandaj paroladoj de

A. Marich kaj organiziĝas la movado sub la gvido de István Nagy-Molnár kaj regna konsilanto M. Dobrovits. Kursojn gvidas Marich. (LVSt: "Malfermiĝis jam la unua kurso, kiun s-o Marich gvidis kun bonega sukceso. La lernantoj ellernis nian lingvon post 6 horoj!") Pluan Kurson gvidis s-ano I. Nagy-Molnár.

La maja n-ro de LVSt el 1909 raportas pri E-grupo en Csetnek (= Štítník), urbeto en la sudslovakia regiono Gemer, fondita de parlamenta delegito Andor Szontagh. La kurson tie gvidis Marich.

La sama n-ro raportas, ke la klubanoj de Vác postulas okazigon de landa E-kongreso.

La E-grupo en Bratislava estas agema, ĝi havas 2 kursojn, la preso ofte raportas pri ĝi.

En la sama n-ro en la nomaro de esp-istaj policanoj troviĝas la nomoj de 2 policanoj el Bratislava kaj la librovendejo Steiner en Bratislava en duonpaĝa anonco propagandas sian vendadon de esperantaĵoj.

La julia-septembra n-ro el la jaro 1910 mencias poresperantan propagandan laboron en Trencsén-Teplic (Trenčianske Teplice), Postöny (Piešťany) kaj Zboró (Zborov?).

En la nomaro de standardistoj troviĝas 29 lokoj en Slovakio kun 138 esperantistoj. Kompreneble, multaj tutcerte ekzistis neorganizitaj en LVSt aŭ neorganizitaj entute. La plej nombraj grupoj estis en Kassa (Košice) – 83 membroj!, Pozsony (Bratislava) 13, Losonc (Lučenec) 11, Verbó (Vrbové) 10 membroj.

En la septembra n-ro de la jaro 1911 troviĝas listo de la LVSt-grupoj, laŭ kiu estis grupoj en tiuj ĉi slovakiaj urboj: Kassa (Košice), Komárom (Komárno), Nagysurány (Šútany), Pozsony (Bratislava).

En aprilo 1914 LVSt raportas pri propaganda kaj kursgvida aktiveo de s-ano Teodoro Austerlitz en Eperjes (Prešov).

La jaro 1911 jam trovas la vicajn de esperantistoj tiel nombraj kaj la bezonon organizi ilin sur pli alta nivelo tiagrade aktuala, ke fondiĝas Hungarlanda Esperanto-Asocio (HES).

En 1912 okazis la Unua Hungara Esperanto-Kongreso kun 306 membroj de HEA kaj alilandaj gastoj. Dum ĝi oni prezentis 3-aktan teatraĵon. En tiu ĉi jaro ekfunkciis hungaria E-eldonejo kaj mem la rektoro de la Universitato, D-ro Johano Kiss fariĝis esperantisto kaj permesis instrui Esperanton en la universitato. La movado vigliĝas, komencas labori Paŭlo Balkányi.

Pri Esperanto ekinteresiĝas ankaŭ laboristoj kaj en 1913 fondiĝis la dua tutlanda societo – Hungaria Esperantista Societo Laborista (HESL). Aperas ankaŭ nova lernolibro de Izoro Polgár. (En la parlamento.....la prezidanto de HES, papa prelato Aleksandro Giesswein sukcese defendis Esperanton kaj la Esperanto-movadon kaj elpaŝis kontraŭ misagoj kontraŭ la movado, precipe laborista.....kaj favore al unuopuloj).

Ankaŭ el tiu ĉi skiza, nekompleta trarigardo, kompilita surbaze de unusola fonto tiutempa (La Verda Standardo), oni povas konvinkiĝi, ke ankaŭ en Slovakio komence de tiu ĉi jarcento jam ekzistis centroj kaj sufiĉe multaj unuopuloj, kiuj vivtenis la ideon de esperantismo. Ĉiu el la societoj nepre devis iel influi ankaŭ la teritorion de Slovakio tiel partoprenigis ĝin kaj ĝiajn loĝantojn en ĉiuj tendencoj.

La eksplodo de la unua mondmilito tute lamigis la ekflorantan movadon en Hungario egale kiel ankaŭ en aliaj landoj.

SLOVAKIA MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO (1918-1933)

La fino de la unua mondmilito kaj la kreo de Ĉeĥoslovaka respubliko radikale kaj ĝisfunde ŝanĝis la situacion en la Esperanto-movado en Slovakio. La nova geografia-politika situacio kaŭzis, ke ekvivis en la nova respubliko du elementoj kun malsama historio de la Esperanto-movado.

En tiu ĉi nova konstelacio havis la slovakia movado tre malfavoran situacion. Dum en la ĉeĥaj landoj la centro kaj la homoj, kiuj direktis la movadon antaŭ la mondmilito kaj partoprenis en ĝi, restis la samaj kaj povis rekomenci, aŭ pli bone dirite daŭrigi la movadon, en Slovakio perdis la ĝisnunan organizan centron (Budapest) kaj la gvidintojn – ili restis ekster la teritorio de ĈSR. La movado en Slovakio eĉ sen tio ne estis iel fortega, kaj nun do por la vivo en la nova respubliko restis el ĝi nur ruinoj.

Kiam en 1920 Bohema unio esperantista kaj Bohema asocio esperantista kunfandiĝis kaj kreiĝis Ĉeĥoslovaka asocio esperantista, kiu reprezentis fakte ĉiunaciajn ĉeĥoslovakiajn esperantistojn – kun la escepto de la germanaj, kiuj havis sian Germanan Esperantistan ligan (GEL, sidejo Liberec), la slovakiaj esperantistoj organiziĝis en ĝi.

Pri la rondetoj el tiu tempo estas nemulte da informoj. Unu aferon oni povas diri tute certe: ke la Esperanto-Klubo en Bratislava persiste daŭrigis sian aktivadon. En la cetera teritorio de Slovakio la movado reviviĝadis kaj organiziĝadis ĉefe dank' al Neslovakoj – Hungaroj kaj Germanoj en la unua kaj Ĉeĥoj en la dua periodo.

La klarigo ŝajnas al mi tute simpla; ĉiu el ĉi nacioj havis jam sian Esperanto-tradicion, kapablajn adeptojn de E. kaj – kio estas tre grava – lernolibrojn kaj studmaterialojn, dum Slovakoj estis en situacio, kiun plej trafe ilustras la menciitaj vortoj de D-ro Kamaryt pri la sorto de la slovaklingva Fundamento.

Estas do memkompreneble, ke la iniciato en la organizado de la kluba vivo estis en la manoj de tiuj, kiuj havis la plej bonajn kondiĉojn por tio. La nacieca situacio en Slovakio tre favoris la kunlaboron en vere zamenhofa etoso, ĉar en pluraj lokoj kunvivis Slovakoj, Hungaroj, Ĉeĥoj, Judoj, Germanoj kaj eble eĉ aliaj (simile kiel en Bialystok), kaj estas interese, ke krom unu ekzemplo – tiu de juda E-rondeto en Bratislava – la esp-istoj en Slovakio neniam apartiĝis en kluboj laŭ nacieco, kvankam kiel unuopuloj ili estis organizitaj en ĈSAE, GEL, LRE aŭ restadis neorganizitaj en centraj asocioj.

Gravegan instigon al ia postmilita revekiĝo, plifortigo, ja eĉ ekesto de la movado en Slovakio aŭ almenaŭ en kelkaj siaj centroj, estis la alveno de ĉeĥaj s-anoj en Slovakion. Bone tio estas videbla en Košice (Josef Friedrich), Tisovec (Josef Vítek), Nové Zámky (Kotoulek, Bujarek), Trnava (prof. Miloš Lukáš), Parkan (Blecha), Trenčín (Zúbek) kaj antaŭ ĉio Bratislava (D-ro Stanislav Kamarýt, prof. Vlado Jukl), sed aŭkaŭ aliloke – en Trenč. Teplice (B. Břicháč), Prešov (Fr. Novotný, V. Hradil) ktp. Ili estis kursgvidantoj, organizantoj, propagandistoj kaj dum 20 jaroj fakte ankaŭ reprezentis Slovakion en la tutŝtata organizo (D-ro Kamarýt, Friedrich). La esperantista vivo en Slovakio en tiuj ĉi cirkonstancoj evoluis tipe kiel agado gvidata de fora centro. Tial eble estas klarigebla la fakto, ke en Slovakio – krom Bratislava – nia afero evoluis en kelkaj pli-malpli izolaj lokoj orientitaj al la centro en Praha, kaj ne penetris en la vastan terenon. Krom tio ĝi estis ofte koncentrita al certaj profesiaj medioj (fervojistoj, lernejoj), kio ja estas tute natura, sed kio tamen iam limigis la efikon al la ĝenerala publiko.

Tiu ĉi situacio karakterizis la tutan dudek-jaran periodon de la unua ĈSR. Al ĝia ekesto kaj daŭro kontribuis la ne-ekzisto de amase eldonita slovaklingva lernolibro. Novaj provoj pri lernolibro restis duonvoje kaj venis tre malfrue: la libreto de Jan Valaš'an-Dolinský "Mluvnice a slovník slovensko-esperantský" (1936) ne povis havi senteble pozitivan influon, estanta sen ekzercaro kaj "Malá učebnice esperanta" de Alojz Macek estis tro modesta kaj krom tio venis en la jaro 1939, kiam sur la ĉielo jam amasiĝadis nebuloj kaj nuboj. Tiel do la ekziston de la movado en Slovakio en la postmilitaj jaroj ni ŝuldas grandparte al niaj alinaciaj samcivitanoj, kiuj kreis ĝin kune kun Slovakoj kaj por ili en vere internacia sento, jam tiel pruvante ĝian vivrajton kaj bezonon.

La rolo de ĉeĥaj ges-anoj en tiu ĉi laboro estis eminenta kaj ankaŭ ĉi-loke kaj ĉe tiu ĉi okazo ni povas nur danki al ili ĉiuj – mortintaj kaj vivantaj – por la grandaj klopodoj por nia afero en Slovakio.

Skribante oficialan historion oni estas limigita je oficialaj fontoj, kaj la oficialaj fontoj havas la malagrablan econ, ke ili registras nur grandajn kaj grandsignifajn agojn; ili plejparte preterlasas la grandan nombron de malpli okulfrapaj etaj agoj, pri kiuj neniu raportas, sed kiuj tamen estas nedisigebla kaj esenca parto de la historio, konsistiganta ofte la materialon, sur kiu la oficiala historio brodas la belajn florojn kaj ornamaĵojn, kiuj tiel plaĉas al la rigardantoj, kaj la rigardantoj plejparte ne interesiĝas, sur kio estas tiuj admirindaĵoj broditaj ...

Tiel do ankaŭ mi, elirante el fontoj, ja tre limigitaj kaj modestaj, montros al vi plejparte nur la florojn kaj ornamaĵojn. Eble ŝajnos al vi, ke estas malmulte da ili sur la granda ŝtofpeco, sed la realo estas tia, kaj ne eblas faktojn alfari.

En la unuaj postmilitaj jaroj estis en Slovakio kluboj fakte nur en Bratislava, Bardejov kaj Košice. En 1923 estis fondita en Nové Zámky la grupo "Esperantista Rondo Amika" kaj ĝi tuj ekgvidis kurson por 53 personoj. Tiuj ĉi kvar kluboj estis la portantoj de aktiveco en siaj propraj lokoj kaj en siaj ĉirkaŭaĵoj: Bratislava influis la urbojn Pezinok, Trnava, kaj Stupava; Nové Zámky influis la lokojn Komárno, Trnava, Nitra kaj Parkan (nun Štúrovo); Košice agis kiel centro por la tuta orienta Slovakio kaj ĝia merito estas ĉiu intereso pri nia movado en Bardejov, Prešov, Spišská Nová Ves, Levoča, (Kežmarok?), eventuale Užhorod kaj Mukačevo.

Mi ne intencas elnombrigi la unuopajn erojn el ilia agado esperante, ke ilia aktiveco sufiĉe reliefiĝos dum miaj pluaj vortoj.

Tamen estus neĝuste supozi, ke tiuj ĉi lokoj estis la solaj, kie brilis nia stelo. Ne, ĉar en la progreso de la tempo nia stelo ekbrilis por pli-malpli longa tempo kaj pli-malpli intense ankaŭ en aliaj urboj kaj urbetoj – ĉiam laŭ tio, kiagrade la situacio estis matura kaj ĉu troviĝis tie la bezona fervora lumportanto. Tiel en la oficialaj sciigoj pri la movado sinsekve aperas la sekvaj nomoj de la lokoj:

- 1925 Pezinok – 2 kursoj (23 kaj 15 personoj)
- 1926 Stupava – kurso en la burĝa lernejo (Bartal)
 - Nitra – kurso po 20 p. (gvidas ERA N. Zámky)
- 1931 Trnava – projektado de filmo en E. (M. Lukáš)
 - Tisovec – eklaboris tie J. Vitek
 - Komárno – 1931/2 kurso de J. Sprušanský
 - Bojná – kurso por 15 p. – Jančarík
 - Zlaté Moravce – 1931/2 kurso de Václav Felt, 10 p.
- 1932 Kežmarok – 3-monata kurso de Magda Feldmannová
 - Topolčany – kurso por 10 p, – Emil Ťapay, lernejestro el V. Uherce
 - Prešov – kurso en la evang. liceo por 31 gelern. – Fr. Novotný
- 1933 Trnava – kurso por 60 stud. – prof. M. Lukáš
 - Rim. Sobota – ekde dec. kurso – org. Tisovec
 - Betliar – 2-klasa kurso de s-ano Bobula
 - Železník – kurso por 26 p. slov.-hung. L. Czibur
- 1934 Žilina – o7. ol. fondiĝis klubo
 - Levice – kurso de Viktor Hidvéghy (ekde 18.10.)

- Parkan – 24.04.34 propag. parolado de J. Blecha
 26.04.34 kurso por 18 p. – Kotoulek
 – Fondita E-rondeto de fervojistoj kiel filio de ERA N. Zámky,
 gvid. Lad. Blecha
- Prešov – o5.o6.34 fondiĝis klubo

- 1935 Žilina – jarkunveno de EK (25.o4.)
Vrútky – kurso komenciĝis fine de sept. – ??
- 1936 Trnava – fondiĝis klubo – ??
- 1937 Trenč. Teplice – Ĉe-metoda kurso – S. Pragano
- 1938 Bardejov – EK kun 45 anoj (refondo – ??)

Tiuj ĉi rondetoj laboris laŭ plej diversaj metodoj – tradiciaj kaj modernaj, ĉiam laŭ siaj bezonoj, eblecoj kaj kapabloj. Relative vigla estis la kursgvida aktiveco. La rondetoj klopodis efektiviĝi almenaŭ unu kurson jare, sed estis ankaŭ tiaj, kiuj aranĝis eĉ 4 kursojn, ofte laŭ nacieco kaj gepatra lingvo de la kursanoj (por Slovakoj, Hungaroj, Germanoj), ja por diversnacia kursanaro laŭ Ĉe-metodo – ne pro la modeco de la metodo, sed pro neceso. Bedaŭrinde, tiu ĉi kursgvidado estas ĝuste tiu konstanta semado, dum kiu centoj kaj miloj da semoj perdiĝas kaj perdiĝadas, sed la senlacaj semantoj semis konstante. Ni jam en tiu ĉi tempo vidas, ke la malnova problemo – pli bona rikolto de nia semado – estis tiam egale aktuala kiel nun: la rondetoj kaj la Asocio ne estis la adekvatan alfluo de membroj kaj la semantoj devis plej ofte kontentiĝi pri la sento de farita devo. Estas malfacilege doni la nombron de la gviditaj kursoj, kaj la provo fari tion donus nur falsan indikon, ĉar iuj kursoj restis neraportitaj du aŭ plurfoje kaj la kontrolo estas neebla. Eble sufiĉos, se ni diros, ke niaj ges-anoj konsciencplene plenumis sian moralan devon.

Sed kursoj ne estis la sola formo de agadmaniero. Por la ne-ĉiam-kunvenantoj kaj por interesuloj el la pli vasta publiko estis aranĝataj solenaĵoj – Zamenhof-festoj, kursfinaj festoj, literaturaj vesperoj, te-vesperoj, akademioj, ekspozicioj (precipe en la pli grandaj kluboj, disponantaj pri la bezona aro de aktivuloj, sed ankaŭ pri la dezirata publiko). En la oktobra n-ro 1925 de "La Progreso" en la raporto pri la E-K en Nové Zámky ni legas, ke la Klubo aranĝis feston kun la partopreno de 300 personoj kaj ekspozicion. Samloke ni legas, ke la klubo havas 2 kursojn kun 82 kursanoj: tio ĉi plej verŝajne estis la rezulto de la propaganda efiko de la ekspozicio kaj de la festo. – Kaj en la sama n-ro ni legas, ke la postkursaj publikaj ekzamenoj en Pezinok rezultigis novan kurson kun 20 partoprenantoj. – En la kinoj de N. Zámky kaj Košice oni en iuj jaroj projekciadis pri-esperantajn diapozitivojn.

La klubaj aktivuloj tamen pensas ankaŭ en pli grandaj dimensioj kaj sentas la bezonon de teritoria organizo kaj kunlaboro. Ili sentis, ke la vero, kiu validis poe Slovakio ĝenerale, nome: "La ĉielo estas tro tro alte kaj Praha tro malproksime" validis ankaŭ por la Esperanto-movado. La Asocio ja klopodis, sed precipe en la unuaj postmilitaj jaroj ĝia kontakto kun Slovakio kaj ĝia influo ĉi tie estis malgrandaj. Por helpi al la Asocio kaj al la tereno, iuj kluboj organizis regionajn kunvenojn.

Tiel la 14an de dec. 1924 okazis en Košice la Unua kunveno de esperantistoj de Orienta Slovakio, kiun partoprenis proksimume 70 ges-anoj kaj amikoj de Esperantoel Bardejov, Košice, Proprad, Prešov kaj Sabinov. Ĝi estis solena, sed priparolis ankaŭ praktikajn problemojn (propagando) kaj decidis aranĝi la sekvontan orientoslovakian – jam laboran – kunvenon printempe de 1925 en Prešov.

La 10-an de majo 1925 okazis en Nové Zámky Kunveno de esperantistoj el Slovakio, Malgrau tio, ke ĝi sukcesis arigi esp-istojn nur el malgranda teritorio – partoprenis en ĝi organizitaj kaj neorganizitaj esp-istoj el N. Zámky, Bratislava, Čúz, Stará Ďala (nun Hurbanovo), Helemba kaj Komárno – tamen eliris el ĝi du gravaj postuloj: 1) ke la sekvonta kongreso de ĉsl. esp-istoj okazu en Bratislava, kaj 2) ke la ĉsl. esp-istoj ne organizu sin laŭ sia gepatra lingvo kaj do ke ĈSEA kaj GEL kunfandiĝu kaj kreu unusolan tutŝtatan organizaĵon. – Jen pruvaĵo pri la provo praktike apliki la sloganon "Unueco estas forto" kaj influu la tutŝtatan movadon per nepre konstrua propono por la bono de ĉiuj.

ĈSEA akceptis la proponon el N. Zámky kaj por progresigi la movadon en Slovakio ĝi decidis organizi la 3-an kongreson de ĉsl. esp-istoj en Bratislava la 28-an de sept. 1925. En Bratislava kreiĝis loka kongresa komitato (LKK), sed trovis pro gravaj personaj kaj lokaj kialoj la daton netaŭga por aranĝo de la kongreso, kaj proponis, ke ĝi okazu la 17-an kaj 18-an de oktobro samjara. Sed ĉar la 17-a de okt. estis labortago, la komitato de la Asocio timis malsukceson kaj decidis prokrastigi la 3-an kongreson por la jaro 1926. Anstataŭ tio la Asocio proponis, ke en la indikitaj oktobraj tagoj okazu Tutslovakia kunveno de esperantistoj, kies celo estu pridiskuti la metodojn por estigo de laŭeble plej intensa movado en Slovakio kaj la detalojn koncerne la starigon de administra filio de la Asocio por Slovakio.

En la septembra n-ro de La Progreso, 1925, estis la kunveno oficiale anoncita. Sed la kunveno ne okazis – pro malgranda intereso ĉe la slovakia esp-istaro. La LKK poste invitis la 3-an kongreson, ke ĝi okazu en Bratislava la 1-an kaj 2-an de majo 1926.

La 3-a Kongreso de ĈSEA fakte okazis en Bratislava en la dirita tempo. Aliĝis en ĝi 239, ĉeestis 211 personoj (194 el ĈSR, 17 el eksterlando), el inter ili 129 personoj el 18 lokoj en Slovakio kun sekva reprezento: Bratislava 82, N. Zámky 13, Pezinok 11, Košice 4, Levice 3, Trenčín 2, Žilina 2 kaj 11 lokoj po 1 ĉeestanto. – Dum tiu ĉi Kongreso estis ankaŭ teatro-prezentado, kaj diference de la unua kaj dua kongresoj ĝi ne estis finance deficita, sed alportis eĉ malgrandan gajnon. – Ĝiaj laboroj estis antaŭ ĉio organizaj kaj la slovakiaj esp-istoj montris eminentan intereson pri estigo de forta organizaĵo kaj movado en nia ŝtato. Pro tio tiu ĉi kongreso apartenas al la plej gravaj en la historio de niaŝtata E-movado – malgrau tio, ke ĝiaj postuloj efektiviĝis nur multe pli poste en la jaro 1935, kaj ekde la 1-a de januaro 1936 ekzistis por la tuta respubliko unu organizaĵo – "Asocio de esperantistoj en ĈSR", kiu jam en 1937 atingis pli ol mil membrojn.

La 27-an de aŭgusto 1926 la E-K en N. Zámky organizis kaj okazigis bone preparitan landan kongreson de blindaj esperantistoj, kiun partoprenis 47 personoj.

El la sekvaj jaroj ni ne havas informojn pri regionaj kunvenoj en Slovakio, dum en la ĉeĥaj landoj ili abundis kaj la aktiveco sur teritoria bazo estas tie ofta. La kialon estas malfacile diri, ĉu eble la laboro de la asocia centro rilate al Slovakio post la 3-a kongreso tiagrade pliboniĝis, ke tiujn regionajn kunvenojn oni konsideris nenecesaj? Kiu scias? Sed estas karakterize, ke dum la 3-a kongreso mem la slovakiaj s-anoj esprimis la opinion, ke ne estas necese starigi filion de la Asocio, se la centro bone laboros.

Interese estas, ke la slovakiaj E-klubo, precipe tiuj, kiuj estis pli fortaj kaj havis pli intensan vivon, jam baldaŭ post la milito ekligis praktikajn internaciajn kontaktojn. En la klubo de Bratislava ili estis sur alta nivelo. Tiel la 21-an de majo 1924 venis al la Esperantista Tablo-Cirlando (tiel nomiĝis la tiama E-klubo en Bratislava) gaste 50 esp-istoj el Vieno kaj pasigis tie tutan tagon.

En septembro 1927 (profitante la interkonsenton pri reciprokaj vizitoj inter bratislavanoj kaj vienanoj) grupo de vienaj ges-anoj venis al Bratislava. Honore al ili okazis en la Slovaka Nacia Teatro solena baled-prezentado, en la kadro de kiu estis prezentita melodramo en Esperanto (deklamis Herold Kosík), kiu ricevis grandan aplaŭdon. Poste interŝanĝis alparolojn D-ro Steiner, gvidanto de la vienanoj, kaj la urbestro de Bratislava D-ro Leopold Sipos (ŝipoŝ) – en Esperanto! (Tio ĉi estis la unua fojo, ke en la Slovaka nacia teatro eksonis Esperanto; ĉu ankaŭ iam poste??)

La 24-an de aŭgusto 1930 estis 12 vienanoj gastoj de la E-klubo de Bratislava. Vizito de vienanoj okazis ankaŭ la 24-an de aprilo 1933; ĉi-foje venis 60-persona grupo. (Post ilia akcepto procesio de 200-personoj kun verda flago iris tra la urbo kaj rigardis ĝiajn vidindaĵojn). Okaze de tiu ĉi vizito okazis interparoloj de la gvidanto de la vienaj esp-istoj kun D-ro Kamarýt, tiam jam prezidanto de ĈSEA, pri aferoj gravaj por ambaŭ landaj movadoj.

Kaj baldaŭ poste, la 3-an de junio 1933, 26 slovakaj skoltoj ekskursis al Vieno (gvidis ilin Alojz Macek) kaj partoprenis la konferencon de aŭstriaĵoj en Vieno.

La 26-an de junio 1933 – 20 anoj de la E-klubo en Bratislava kaj Trnava ekskursis al Hamburgo en Aŭstrio, kie ili renkontiĝis kun esp-istoj el Hainburg, Deutsch Altenburg kaj Vieno kaj havis amikajn interparolojn kun ili.

En la jaro 1934, la 14-an de oktobro, grupo de la t.n. juna generacio de vienaj esp-istoj (17 personoj) venis vizite al Bratislava.

La plej granda karavano en la historio de la E-movado en Bratislava venis la 20-an de junio 1934. Tiun tagon 260 ges-anoj el Vieno marŝis solene tra la urbo. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la tiama Slovenská rada pre cestovný ruch.

Ankaŭ aliaj kluboj praktikis kontaktojn kun la mondo. Tiel ekzemple la E-K en Košice aranĝis en la tagoj 28-a de junio – 7-a de julio 1935 ekskurson al Nederlando, kaj en majo 1936 la klubo gastigis grupon de 13 nederlandaj kaj 1 norvega fervojistoj.

Meze de majo 1937 grupo de 12 svedaj geesperantistoj vojaĝantaj al la mondekspozicio en Parizo vizitis la E-klubojn de Nové Zámky kaj Bratislava.

Tre verŝajne estis ankaŭ nombraj aliaj, neraportitaj vizitoj, kiuj kune kun la menciitaj multe kontribuis al la plivigligo de la klubo vivo kaj havis grandan propagandan efikon.

Similan efikon havis la prelegvojaĝoj de eksterlandanoj ĉe ni. La unua estis tiu de la fama amerika esperantisto-vojaĝisto **Joseph Scherer**, kiu estis en Ĉeĥoslovakio dufoje, en la jaroj 1931 kaj 1937. Dum la unua vojaĝo li prelegis en Košice (la 2-an de nov.) dufoje antaŭ kune pli ol 1300 ĉeestantoj, el tio 750 gestudentoj kaj profesoroj. La 21-an de nov. 1931 radio Košice elsendis lian paroladon "Vojaĝaj impresoj el ĈSR". En Bratislava ĉeestis lian paroladon (la 23-an de nov. 1933) 400 personoj.

En 1937, la 29-an de januaro, li prelegis en Spišská Nová Ves 3 foje al sume 1700 gelernantoj kaj unu foje al plenkreskuloj (160 p.). La 1-an de februaro prelegis Scherer en Tisovec antaŭ 530 aŭskultantoj. Lia parolado instigis estigon de nova kurso. Krom tio li havis 3 prelegojn en Košice antaŭ sume 700 personoj.

Alia sukcesplena prelegvojaĝo estis tiu de nigra esp-isto **Kola Ajayi** (aĵaji), kiu en majo 1933 havis prelegojn pri Afriko kaj pri sia hejmlando en Košice (2), Rim. Sobota (2), Trnava kaj (07.05.33.) en Bratislava – kune 7 prelegojn antaŭ sume 2900 personoj. Tiu ĉi prelegserio estis propagande tre efika. – La duan fojon venis Kola Ajayi en 1938 kaj tiuokaze li prelegis en Bardejov (02.11.), Košice (03.11.), Levoča (04.11.) kaj Spišská Nová Ves (05.11.).

La ĉefa propaganda okazintaĵo en la jaro 1934 estis la vizito de indonesia ĵurnalisto **Haĝi Mustafa Raden**. Li prelegis en pluraj lokoj pri Java, Bali kaj Krakataŭ: la 23-an de febr. en Košice (280 p.) kaj en la radio tie; li vekis grandan intereson, presipe inter la studentaro kaj skoltoj.

La 20-an de febr. li parolis en Prešov 2 foje (por 720 gestudentoj kaj 310-persona publiko). Poste li prelegis ankaŭ en Tisovec kaj Bratislava.

Tamen la plej profundan influon havis la vizito de estona E-instruisto **Henrik Seppik**. Li ne nur faris nombrajn propagandajn prelegojn, sed ankaŭ tuj rikoltis la fruktojn de sia propaganda laboro kaj en la lokoj, kie li estis preleginta, li poste gvidis kursojn laŭ la Ĉe-metodo. En la jaro 1936 li kaj lia edzino Erika havis en Slovakio prelegojn en Košice, Sp. N. Ves, Bardejov, Bratislava (3), N. Zámky kaj Parkan. Krom tio li havis 6 prelegojn en la radio Košice kaj intervjuojn en la

ĵurnalo "Slovenský vychod".

En la jaro 1938 Seppik venis denove kaj havis provleciojn kaj kursojn en Košice (ekde 10.01.38 por 140 p.) kaj Bardejov (24.01.38) – 2 kursoj – 25 gelernantoj, 60 plenkresk. – Sed lia dua restado en Slovakio estis pro la okazintaĵoj de la jaro 1938 konsiderinde malpli longa ol la unua.

De malpli longa daŭro (kaj signifo) estis la restado de prof. **Sigismundo Pragano** en Slovakio, kiu gvidia Ĉe-metodajn kursojn en 1937 en Žilina kaj Trenč. Teplice kaj en 1938 en Trenč. Teplice.

Krom tio estis notita ĉe ni la vizito de vojaĝanta propagandisto **H. Vogelfang**, kiu en majo 1937 prelegis en junulara societo en Prešov.

En la kategorion de tiuj ĉi vojaĝoj apartenas ankaŭ la vizitoj de hungaraj s-anoj **Julio Baghy** kaj **Vilmos Bleier** en Slovakio. Julio Baghy vizitis la 4-an de sept. 1927 la E-K en Bratislava kaj la 6-an de sept. la klubon en Nové Zámky. En ambaŭ lokoj li legis kaj deklamis siajn verkojn. Tiu ĉi vizito vekis ankaŭ ĉe aliaj kluboj la deziron akcepti s-anon Baghy ĉe ni. La 1-a de julio 1930 Julio Baghy denove legis el siaj verkoj en Bratislava.

En la kadro de sia prelegvojaĝo (nov.- dec. 1932) en ĈSR s-ano Vilmos Bleier, la eldonanto de Literatura Mondo, prelegis la 26-an de nova 1932 en Bratislava pri "Esperanta literaturo kaj Esperantaj verkistoj".

En majo 1933 prelegis en Bratislava redaktoro **Hovorka** el Vieno.

Estas interese kaj nepre necese konstati ke tiuj, kiuj aktivis kiel propagandistoj en Slovakio, ĉiam celkonscie direktis sian intereson al specialaj medioj, sociaj kaj profesiaj grupoj. Tiel ekzemple oni ekde la unua momento konciis pri la graveco de la enkonduko de Esperanto en la lernejon. Ĝi estis la baza taktiko kiel akiri la junularon, sed ankaŭ interesigi la pedagogojn. Sekve do jam dum la lernojaro 1923/4 prof. Vlado Jukl instruis Esp-on al 14 gelernantoj en la Komerca akademio en Bratislava, kaj D-ro Stanislav Kamarýt instruis Esp-on al 33 lernantoj de la Ŝtata realgimnazio kaj al 16 lernantoj de la burĝa lernejo samloke. En la 10-a (oktobra) n-ro de Progreso, 1923, pĝ. 110, ni povas legi: Esperanto kiel deviga fako estas instruata en Urba burĝa knabina lernejo en Bratislava laŭ decido de la urbeŝtaro el 4.XII.1925 n-ro 86307 prez. 25. Kiel instruisto estas nomita per la sama decido s-ano Herold Kesik, urba oficisto, aprobita por Esperanto en burĝaj lernejoj."

Per la dekreto de la Ministerio por instruado n-ro 29 390-I-26 el 9-a de marto 1926 estis ĉe "Ekzamena komisiono por popolaj kaj civitanaj (burĝaj) lernejoj" en Bratislava nomitaj novaj ŝtataj ekzamenantoj por E.: por la ĉeĥoslovaka (instru-lingvo D-ro Kamarýt, por la hungara s-ro Ema Wanitschek.

En la lernejjaro 1927/8 prof. Vlado Jukl instruis Esp-on al 28 gelernantoj de la Komerca akademio en Bratislava. En la jaro 1931/2 li gvidis en la sama lernejo kurson por 13 gelernantoj.

En Kežmarok en la burĝa lernejo estas instruata dum la lernejjaro 1952/3 E. kiel nedeviga fako (inst. Margit Feldmannová).

Dum la lernejjaro 1932/3 prof. Miloš Lukáš en Trnava gvidis kurson por 60 gestudentoj.

En oktobro 1937 s.ano Vitek en Tisovec komencis kurson por 50 gelernantoj de la burĝa lernejo. Kaj en N. Zámky post la Zamenhofa tago en dec. 1937 komenciĝis kurso por 25 lernejoj infanoj. (Instr. A. Machová.)

En Parkan dum la lernejjaro 1937/8 Esp-o estis instruata en 2 klasoj de la burĝa lernejo al 45 lernantoj (instr. Duroň, Blecha) kaj la lerneja gazeto "Naše slovo" havis E-anguleton, redaktatan de Lad. Blecha, UEA-Delegito.

Ĉu la burĝa lernejo de Gelnica aperadis lerneja gazeto kaj en ĝi estis kurso de Esperanto.

En Prešov la urba kleriga konsilantaro organizis E-kurson en la evangelia gimnazio ekde novembro 1934. La jaron antaŭe gvidis tie kurson por 25 gelernantoj prof. F. Novotný.

Kompreneble, tio ĉi certe estas nur parta elnombro de ĉiuj lernejoj kursoj okazintaj dank' al niaj tiamaj fervoruloj, ĉar ne raportis pri sia agado ja ne estas nova malsano de esperantitoj. Krom kursoj por la gelernantoj de iuj lernejoj estis relative ofte aranĝataj kursoj por junularo ĝenerale. Tiajn kursojn havis Košice en 1933, 2 kursojn por studentoj kaj skoltoj en 1934, sed ankaŭ aliaj lokoj, kaj destudentoj, kompreneble, partoprenadis ankaŭ en la kursoj por la ĝenerala publiko.

Granda parto de la informa kaj propaganda laboro estis direktita al la junularo. Tiel ekz. la plejparton de la publiko en la prelegoj kaj lumbildprojekciadoj de la renomaj propagandistoj Scherer, Raden kaj Seppik rekrutiĝis el inter la junularo. En la jaro 1937 okazis helpe de E. ekspozicio de infandeseĝnaĵoj en Prešov.

Sed ankaŭ la studentoj mem estis aktivaj kelkloke. En Prešov ili mem aranĝis paroladojn (en 1934, Friedrich el Košice por 300 gestud. kaj prof., en 1937 B Vogelfang) kaj en Michalovce aŭtune de 1936 studento Šimkanin parolis en la lernejo pri "Evoluo kaj signifo de Esperanto."

La aktivecon de la junularo en la movado kaj la ĝustan aliron al la junularo en Košice pruvas la fakto, ke en 1934 en la E.klubo de Košice, kiu havis 42 anojn, 14 el la anoj estis gimnaziaj studentoj.

Studentoj estis ankaŭ la kerno de la publiko okaze de la projekciado de turisme-informa filmo en E. "La bela Danlando", kiu estis projekciata en Trnava la 18-an kaj 19-an de jan. 1931 kvar foje, kaj en Bratislava la 20-an kaj 21-an de febr. al entute pli ol 3600 gelernantoj.

Specialan kategorion inter la junularo reprezentis la la skoltoj. La poresperanta laboro inter ili certe estas malnovdata, sed la unuan raporton pri kurso por skoltoj ni havas el la jaro 1930, kiam s-anoj Csáder (Maljuna Urso) kaj Kolomano Kiss gvidis kurson por 50 hungaraj skoltoj kaj en la hungarlingva por-skolta gazeto Tábortüz (la bivaka fajro) aperadis E-paĝo. Komence de jan. 1932 s-ano Csáder anoncas sin al la laboro inter skoltoj-esperantistoj. En la n-ro 7-8 de Progreso 1932 Csáder aperigis ½-paĝan "Alvokon al la neskoltoj" rilate esperantigon de skoltoj, kaj anoncon, ke dank' al lia klopodado. En 1932 en Slovakio estas en preparo 14 kursoj de E. por skoltoj. Lin helpis Kolomano Kiss, Alojz Macek, G. Wurm kaj en Komárno Julio Havas, kiu en tiu tempo gvidis tie kurson por mezlernejaj skoltoj. Tiujara studenta kalendareto, eldonita por hungaraj skoltoj, enhavis la tutan gramatikon de E. kun skoltaj fakesprimoj (entute 3 paĝojn). En 1933 havis en Bratislava kurson por slovakaj skoltoj Alojz Macek kaj por la hungaraj K. Kiss.

La 7-an de majo 1933 Kola Ajayi, kiu tiam prelegis en Bratislava, estis akceptita de la skoltoj. En 1935 E-K en Košice havis 2 kursojn por skoltoj kaj junularo. Samjare, la 10-an de febr., la E-faka de la Centro de slovakaj katolikaj skoltoj aranĝis E-akademion, kiu bone sukcesis.

En jaro 1934 la aprila E-horeto en Radio Bratislava estis dediĉita al por-skolta programo.

Tamen, la plej elstara skolta kaj por-skolta aranĝaĵo estis la Internacia tendaro de Skolta Esperantista Ligo, okazinta la 15-an ĝis 31-an de julio 1934 en Kordíky, vilaĝo apud Banská Bystrica. Ĝi havis grandan propagandan efikon, sed ŝajnas, ke pli sur la vastan publikon ol sur la skoltan mem. En la Bulteno de ĈEA n-ro 2/37 ni povas legi: La skoltoj estas indiferentaj al Esperanto, nur la katolikaj skoltoj en Slovakio interesiĝas. Estis 14 kursoj en diversaj urboj, sed restis nur ĉ. 50 geskoltoj uzantaj Esp-on internacie.

La gvidantoj de la movado en Slovakio ekde la unuaj momentoj estis konsciaj pri la graveco de la ne-esperantista preso por la movado. Ili eluzis ĝin ĉu por aperigado de sciigoj, ĉu por sistema propagandado-klarigado de Esperantaj realaĵoj, ĉu por aperigado de kursoj kaj E-rubrikoj. La nombro de ĵurnaloj aperigantaj sciigojn (variis, sed la intereso de la preso neniam ĉesis. Ĝi raportis vigle precipe pri la publikaj, laŭenhave interesaj prelegoj de la jam menciitaj propagandvojaĝistoj

Scherer, Raden kaj Seppik, sed kelkaj raportadis regule ankaŭ pri la vivo de la plej viglaj kluboj kaj rondetoj.

Pri la kluboj de Bratislava raportadis la ĉefurbaj gazetoj slovakaj, hungaraj kaj germanaj. (En Bratislava estis 3 kluboj: la neŭtrala, la laborista kaj la juda.) La klubo en Košice aperigadis priesperantajn materialojn kaj informojn en la ĵurnalo "Slovenský východ". La s-anoj en Prešov ofte aperigadis artikolojn pri sia aktiveco en la ĵurnalo "Šariš". Pri la laboro de la rondeto en Tisovec kaj de la esperantistoj en Rimavská Sobota raportadis la regiona periodaĵo "Gemer"-Malohont". La revuo "Zem" aperigadis altnivelajn artikolojn pri la E-movado kaj fakajn artikolojn tradukitajn el Esperanto (precipe fare de s-ano Paŭlo Rosa).

Pri la prelegvojaĝo de Kola Ajay raportis Gemer-Malohont, Slovák, Slovenská Politika, Slovenský denník, Slovenský ľud, Slovenský východ.

Pri la ĉeĥoslovaka n-ro de "Literatura mondo" raportis Národné noviny, Ľudová politika, Nové Slovensko. Diversaj gazetoj favore raportis ankaŭ pri la agado de ges-anoj Seppik, kaj alportis intervjuojn kun ili.

Sed estis ankaŭ regulaj Esperanto-rubrikoj en la slovakaj tagĵurnaloj kaj fakaj periodaĵoj. Tiel ekz. en "Robotnické noviny" (1932), "Slovák" (1932), "Zpravodaj zamestnancov št. železnic v Bratislave", "Plameň" (1936) kaj "Slniečko" (porjunulara kaj porinfana).

Kompreneble, la rubrikoj daŭris ĉiam nur certan tempon kaj la informado estis plejparte sporada kaj nesistema, sed pro sia relativa ofteco ĝi efikis tre bone.

Ĉi tie estas la ĝusta loko paroli ankaŭ pri la ekspozicio pri la tutmonda preso 21.08.-11.09.1932, okazinta en Košice, kiu havis Esperanto-fakon. La ekspozicio estis vizitita de 22 000 personoj, kiuj ĉiuj vidis ankaŭ la E-fakon. Ankaŭ en la ekspozicia program-bulteno estis E-artikolo.

Kun la informa kaj propaganda laboro de la preso estis intime interligita la aktiveco de la slovakia radio, de ambaŭ elsendiloj Bratislava kaj Košice.

La unua elsendo okazis la 24-an de aŭgusto 1928. Ĝi estis turisma-propaganda artikolo, legis ĝin Herold Kesik. Plua prelego sekvis la 22-an de sept. 1928. La 22-an de aŭg. estis elsendita deklamado, la 8-an de dec. 1929 prelego pri art-ekspozicio, la 9-an de jan., 13-an de febr., 28-an de aprilo kaj 21-an de majo 1930 serio da prelegoj pri la slovakia literaturo.

La 1-an de okt. 1930 komencis radio Bratislava elsendadi kurson de Esperanto – dufoje semajne, por Slovakoj; la kurson gvidis s-ano-Wanitschek. La kurso konsistis el entute 48 lecionoj kaj finiĝis en majo 1931.

En vintro 1932/3 – la 22-an de dec. 1932 komenciĝis en radio Bratislava sub la gvido de prof. Vlado Jukl regula elsendado de Esperanta "duonhoreto" kun diverstema programo parola, muzika, kanta. La 26-an de Junio 1933 la radio elsendis specialan por-skoltan programon. La 3-an de oktobro 1934 okazis grava evento: ĉiuj ĉsl. radiostacioj elsendis samtempe Esperantan programon.

Krom tiuj ĉi pli-malpli regulaj programoj la radio relative agoprete reagis je la ĉeesto de la jam menciitaj esperantistoj-propagandvojaĝistoj Haĝi Mustafa Raden, Joseph Scherer kaj Henrik Seppik kaj elsendis kun ĉiuj el ili intervjuojn, iliajn prelegojn en Esperanto kaj traduko kaj iliajn programojn de popolkantoj. Ĉi-rilate plej vigle laboris raduo Košice. Plej bedaŭrinde, en Bratislava tiu ĉi favora situacio ne daŭris tro longe, ĉar en 1933 ni ne plu trovas Esperanton en la elsendoj de Bratislava, dum radio Košice elsendis ankoraŭ en 1936 ses prelegojn de H. Seppik.

Paralele kun la klopodoj akiri la lernejan junularon iras la informa laboro celita al la instruistaro. El ĉi-rilataj klopodoj ni menciuj almenaŭ kelkajn ekzemplojn: en aprilo 1932 s-anino Margit Feldmannová, instruistino en Kežmarok, prelegis pri E. dum la konferenco de la instruistoj de sia lernejo kaj post semajno en la konferenco de la instruistoj de la tuta distrikto. Ŝi vekis viglan intereson kaj diskuton.

La "Centra societo de ĉsl. profesoroj" havis Esperantan sektion. En majo 1931 estis kiel ĝia prezidanto elektita prof. Vlado Jukl el Bratislava.

En oktobro 1937 gvidis en Trenčianské Teplice prof. Sigismundo Pragano Ĉe-metodan kurson por 20 geinstruistoj, aranĝita fare de la Hejmo de la kanthoro de slovakaj instruistoj.

La informoj denove ne estas kompletaj por povi doni statistike plenan bildon pri la stato de la afero. Fakte estas, ke instruistoj en tiu epoko neniam mankis en niaj vicoj kaj sur iliaj ŝultroj pezis granda parto de la laboro.

En 1936 Henrik Seppik dum sia restado en Košice havis ankaŭ specialan provlecionon por instruistoj.

Krom la menciitaj klopodoj kaj atingajoj estas menciinda ankaŭ la pozitiva sinteno de la fervojo al nia movado. Jam en 1924 la direktoro de la ŝtata fervojo en Košice per sia dekreto de la 28a de decembro rekomendas oficiale al la fervojistoj de Košice la E-kurson gvidotan de J. Friedrich.

En 1931 la ŝtata forvojo eldonis 24-paĝan gvidlibreton pri Altaj Tatroj en Esperanto.

En 1933 ankaŭ la fervojdirekcio en Bratislava rekomendas Esperanton.

En aprilo 1934 fondiĝis en Parkan (nun Štúrovo) E-rondeto de fervojistoj kun 12 membroj kiel fervojista sekcio de ERA en N. Zámky; la gvidanto estis Lad. Blecha. Samtempe ERA kunlaboris vigle kun lokomotiva grupo en N. Zámky.

En 1935 aperis jam la 10-a eldono de la E-prospekto pri Altaj Tatroj, eldonata fare de la Ministerio de fervojoj. (Tradukis ĝin Ota Ginz.)

La 2-an de okt. 1936 komenciĝis en N. Zámky E-kurso por 30 gekomencantoj (slovaklingve), organizita de la loka fervoja oficejo!

Kaj ne laste karakterizas la favoran sintenon de la fervojo al E. en Slovakio la fakto, ke en 1937 el entute 72 stacidomaj informtabuloj 14 estis en Slovakio (en Kežmarok, Komárno, Košice, Poprad-Veľká, Prešov, Senica n/Myjavou, Tisovec, Trenčianské Teplice, Trnava, Turd. Sv. Martin, Výlok, Zvolen, Žilina).

Konsiderindan signifon havis la eldonado de turismaj prospektoj. La unua konata oficiala prospekto pri slovakia loko estis tiu pri Trenčianské Teplice (). Baldaŭ post ĝi aperis prospekto pri la montegaro Vysoké Tatry – Altaj Tatroj, eldonita fare de Asocio por fremdultrafiko. – En 1934 la urbo Košice eldonis 8-paĝan turisman prospekton en 3 lingvoj, inter ili Esperanto, – en 1935 aperis prospektoj pri la grotoj Domica, Jasovská kaj Bielska.

Kaj Esperanto servas ankaŭ en diversaj publikaĵoj de ekstermovada karaktero. Tiel okaze de la Pribina-festoj en 1933 estis eldonita fare de la Organiza komitato de la fosto la broŝuro "La unua slovakia kristana princo", kompilita de D-ro Stan. Kamarýt. Ĝi estis plaĉa, bona informilo pri la historio de la Granda Moravio kaj Slovakio.

Pli grava tamen estis – en 1936 – la apero de "Ĉeĥoslovaka antologio", en kiu aperis la unuaj seriozaj tradukoj el slovakia literatura – poezio kaj prozo.

En 1936 aperis ankaŭ "Mluvnica a slovník slovensko-esperantský" de Ján Valaš'an-Dolinský, eldonita fare de la Hejmo de la Kanthoro de slovakaj instruistoj en Trenč. Teplice. La sekvan jaron aperis "Malá učebnica esperanta" de Alojz Macek, bedaŭrinde multilate riproĉebla laŭ la vidpunkto de korekteco.

Ne tre granda, sed por la afero tre karakteriza estas la intereso de iuj specialaj rondoj. Specimene ni menciis, ke D-ro Kamarýt en januaro 1931 prelegis en Rotary-klubo en Bratislava. Samjare aranĝis por siaj anoj E-kurson la socialdemokrata sindikato Typografia. – En 1937 Esperanto estis uzata en la tutŝtata filatela ekspozicio en Bratislava; estis eldonitaj ankaŭ poŝtaj valoraĵoj kun Esp-a teksto.

Ne estas malinterese iomete analizi la reciprokan rilaton de ĈSEA kaj Slovakio. La Asocio klopodis starigi bonan kontakton kun Slovakio. Atestas pri tio ĝia preteco malfermi ekspozituron por Slovakio kaj la okazigo de la 3-a kongreso de ĈSEA en Bratislava (en 1926). Al tiu ĉi bona evoluo multe helpis la fakto, ke la ĉefaj funkciuloj de la slovakia E-movado estis ĉeĥoj.

La Asocio ĉiam konsciis pri la relativa malforteco – precipe laŭ nombro kaj grado de organiziteco, el kiu sekvis ankaŭ la grado de aktiveco – tial ĝi entreprenis laŭ siaj eblecoj tiajn agadojn, kiuj celis plifortigon de la movado. Al tiuj ĉi aktivecoj apartenis ankaŭ la eldona aktiveco de ĈSEA.

En 1930 aperis la 1-a eldono de slovakia "ŝlosilo de Esperanto" en 3000 ekz. En 1936 ĈSEA eldonis propagandan slovaklingvan flugfolion "Jeden jazyk pre celý svet" kaj la 2-an eldonon de la ŝlosilo. Pri la distribuo estis komisiita s-ano J. Friedrich en Košice.

Ankaŭ la sinteno de slovakiaj esperantistoj rilate al la Asocio estis pozitiva. Atestas pri tio jam la rezolucio el N. Zámky postulanta unu fortan asocion anstataŭ organiziĝo laŭ gepatra lingvo aŭ aliaj kriterioj, kaj pli poste antaŭ ĉio la fakto, ke post la jaro 1930 la slovakiaj rondetoj (Bratislava, Košice, Prešov, Žilina, Bardejov, Prešov) kaj en la lastaj jaroj ankaŭ N. Zámky) aliĝadis korporacie al ĈSEA. Ankaŭ la relativa nombro de la anoj el Slovakio altiĝadis: dum en 1926 la Asocio havis el Slovakio proksimume 50 anojn, en 1933 jam 102, en 1933 estis da ili pli ol 135 kaj en 1937 proksimume 200. En la komitato de ĈSEA Slovakio havis ĉiam minimume 3, ekde 1937 4 reprezentantojn.

1938 – 1945

Bedaŭrinde, tiu ĉi ekfloro de la movado, konstatebla en Slovakio post la kreo de unusola Asocio de esperantistoj en ĈSR, estis senkompatate interrompita de la II-a mondmilito. La teritorion de Ĉeĥoslovakio okupis nacia socialismo, la esperantist-vivo kaj en rondetoj kaj private ĉesis. La sola escepto estis la Esperanto-klubo en Bratislava, kiu dum la tuta milito funkciis, severe kontrolata de la sekreta polico. (Ĝiaj funkciuloj ofte havis malagrablajn, ja eĉ estis persekutatajn.) Ja, la rondeto atingis eĉ pli multon: la Ministerio por internaj aferoj de Slovaka ŝtato per sia dekreto n-ro 214-5/6-4/43/D-21/1 Brat. aprobis la ŝanĝitan statuton de la klubo, kaj kiel ĝian agadkampon destinis la teritorion de la tuta Slovaka respubliko (Slovaka ŝtato). Do la klubo povis akcepti membrojn el ĉiuj lokoj de Slovakio kaj sekve funkcii kvazaŭ tutŝtata centro por ĉiuj esperantistoj en Slovakio! Pri tiu ĉi afero informis la E-klubo en Bratislava per sia cirkulero en januaro 1944. Kompreneble, tiu ĉi fakto havis plejparte nur enlandan signifon, sed estis grava, ĉar ĝi ebligis organizan laboron kiel antaŭpreparon por eklaboro post la milito.

La postmilitan tempon (1945-1969) mi prefere prezentos en ĥronologia sinsekvo; tiel pli bone montriĝos ĝia dinamismo, kiu estas ĝia ĉefa karakteriza trajto, multon klarigas, multon pravigas, ja eĉ senkulpigas kaj pardonigas.

La unua signalo post la milito estis mia alvoko en "Považský hlas", per kiu mi arigis la esp-istojn kaj interesulojn en Trenčín. La rezulto estis kunveno, kurso (laŭ Fundamento), rondeto.

Printempe en 1946 aperis la unua kajero de "Esperantisto Slovaka", eldonita de s-ano Ernesto Váňa en Žilina, kaj lia lernolibro, baziĝanta plejparte sur la zamenhofa Fundamento, sed malpli sistema.

La 5-an de majo 1946 estis fondita Slovaka Esperanto-Societo kun sidejo en Bratislava. Ĝia Organiza fako funkciis ekde la 1-a dec. 1946 en Trenčín, kun mi kiel gvidanto. SES komencis eldonadi sian oficialan bultenon Informoj de SES.

La 4-an de aprilo 1946 la Komisiitejo por lernejoj per sia dekreto 121.233/46-IV/6 permesis al porkomercaj lernejoj instruadon de Esperanto kiel nedevisa instrufako. La inspektoro por komercaj lernejoj estis s-ano V. Jukl.

En 1946, aŭtune, aperis ankaŭ la dua (kvarobla) kajero de Esperantisto Slovaka. Ĉar pro sia neregula aperado ES ne povis plensukcese plenumi sian taskon, ĝi estis fine de tiu jaro transprenita de s-anoj Lamačka kaj Tvarožek kaj eldonata dum 1947 en Trenčín, pli-malpli regule, monate.

En oktobro 1946 komenciĝis en la Komerca altlernejo lecionoj de Esperanto; la lektoro estis Paŭlo Rosa.

En la lernojaroj 1946/7 estis permesita nedevisa instruado de Esperanto en la burĝa lernejo en Klenovec.

En 1946 la 1-an de dec. fondiĝis rondeto en Trnava.

La slovakaj esperantistoj en sia laboro procedis laŭ la senco de la t.n. Konvencio de Brno, interkonsentita en februaro 1946 fare de reprezentantoj de ĈSEA kaj SES. La konvencio proponis, ke en Slovakio kaj en ĉeĥaj landoj estu du memstaraj naciaj E-organizaĵoj – unu por Slovakio kaj unu por la ĉeĥaj landoj, kaj ke tiuj ĉi kune formu la novan Esperanto-Asocion de ĈSR sur federacia bazo kiel superan, "tegmentan", reprezentan organizaĵon. (Vidu "Esperantista" de la 15-a de dec. 1946). La ĝenerala kunveno de SES akceptis kaj aprobis la konvencion, sed EAĈSR ne. (Pli detale pri tio vidu en la kontribuado de s-ano J. Mařík.)

En la jaro 1947 ekregis inter la esperantistoj en Slovakio granda por-esperanta entuziasmo. Sed tiu granda entuziasmo ne ĉiam alportis la deziratan kaj dezirindan rezulton: ofte ĝi estis sen sperto kaj sen firma bazo, ofte nur romantika reago de la postmilita ĝojo je la eventualaj eblecoj en pli bona mondo. Ofte ĝi estis pajla flamo, sed malgraŭ tio iam eĉ post ĝi restis iaj-tiaj daŭraj rezultoj.

En tiu ĉi jaro ekaperis en la semajna ilulstrita revuo "Svet" Esperanta rubriko (gvidata de s-ano I. Zálupský) kaj en nombraj aliaj periodaĵoj aperadis raportoj kaj informoj. fondiĝis rondetoj en Malacky (studenta), Košice, Martin, Sabinov, Trebišov, Prešov.

Kursoj okazis en Nové Zámky, Prešov, Zvolen, Žilina.

Dum la pentekosta semajno okazis en Smokovec jarkunveno de pli ol 700 komercclernejaraj profesoroj. La ĝenerala kunveno... akceptis Esperanton kiel nedevisan instrufakon instruotan ekde 1947/8 en ĉiuj komercaj akademioj kaj lernejoj. (Esperantista 15.07.1947.).

Tamen, la plej grava okazintaĵo de tiu ĉi jaro estis la **1-a Tutslovakia Esperanto-kongreso**, okazinta la 13/14-an de julio, kiun partoprenis 130 personoj. Tiu ĉi kongreso estis fortega instigo al sistema, celkonscia agado, tiel bezona por fari la pluajn klopodojn de la slovakiaj s-anoj realaj kaj iliajn rezultojn daŭraj.

Bonega helpo ĉi-rilate estis la samjara apero de du helpiloj-lerniloj: "**Okienko do sveta**" – lernolibreto de J. Valaš'an-Dolinský, kaj de "**Esperanto v 14 úlohách**" de E. V. Tvarožek. Fine de tiu ĉi jaro (1947) estis fondita en Martin "**Slovaka Esperanto-Instituto**". Ĝi fakte ne estis instituto; sed kiel fako de la E-klubo en Martin ĝi estis laŭjura bazo por eldona aktiveco. Kvankam laŭforme nur tia, ĝi ebligis farojn de granda signifo, kiuj donas fruktojn eĉ hodiaŭ, post pli ol 20 jaroj.

La Centro por fremdultrafiko per sia dekreto 5468/47 Dr/On rekomendis kunlaboron kun Esperantisto Slovaka. Por tio ĉi ni dankas al Slovakotour, loka oficejo en Trenčín.

"Krásy Slovenska", porturisma revuo, redaktata de s-ano D-ro Ludoviko Izák, uzas Esperanton kiel unu el la fremdaj lingvoj por klarigaj titoloj al la ilustraĵoj kaj en resumoj.

En la slovakiaj komercaj akademioj Esperanto estis dum la lernejjaro 1947/8 instruata kiel nedevisa instrufako en Bratislava, Trenčín kaj T. Sv. Martin.

La skolta revuo "Slovenský junák" kaj la porjunulara gazeto "Plameň" havis kursojn de

Esperanto.

La jaro 1948 signifas plifirmigon de la movado sur solida bazo de Slovaka Esperanto-Societo kaj Slovaka Esperanto-Instituto. SEI transprenis la eldonadon de *Esperantisto Slovaka* kaj faris ĝin sia organo, kio signifis plialtigon de ĝia kvalito laŭ enhavo kaj aspekto. En tiu ĉi jaro SEI eldonis gravan verkon, la "Malgrandan vortaron Esperantan-slovakian kaj slovakian-Esperantan" de J. V. Dolinský kaj 4 multkolorajn kartoformajn reproduktaĵojn de bildoj de Martin Benka kun Esp-a teksto. En *Esperantisto Slovaka* aperis la unua porturisma n-ro (pri Žilina kaj ĉirkaŭaĵo); aperis Esperanto en turisma prospekto pri Trenčín.

Krom tio aperis 6 plene Esp-aj prospektoj (pri Vyšné, Hággy, Rajecké Teplice, Vizitu Altajn Tatroj, Vintro en slovakaj montaroj, Saluto el Svit kaj Altaj Tatroj, kaj Bratislava.)

Dum la jaro okazis 16 publikaj kursoj. En 3 gimnazioj estis studrondetoj (Galanta, Kežmarok, N. Zámky). – Radioj Bratislava kaj Košice sporade elsendis en Esperanto, minimume 7 foje.

La slovakaj senato de la Tutŝtata ekzamena komisiono, fondita en Liberec dum la kongreso, eklaboris kaj la 19-an de junio 1948 ekzamenis en Svit 20 ges-anojn.

En la tagoj 21-23-a de aŭgusto 1948 okazis en Košice **la 2-a Slovaka Esperanto-kongreso** kun 250 partoprenantoj. Partoprenis ĝin tiom da ges-anoj el ĉeĥaj landoj, ke ĝi fakte estis ĉeĥoslovaka kongreso. Ĝi havis eĉ postkongreson en Svit (24-28-an de aŭg. 1948).

En tiu ĉi jaro komenciĝas la tradicio de **regionaj kunvenoj**. La unua okazis la 1-an de aŭg. 1948 en Nové Mesto nad Váhom.

La jaro 1948 signifas ankaŭ la unuan vivan kontakton kun la eksterlanda movado – nome per la oficiala partopreno de funkciuloj de SES en la 1-a Danubvala Esperanto-konferenco en Budapeŝto (22-25-an de aŭg. 1948) kaj en ĝiaj laboroj. SES estis petita organizi la 2-an DEK, se la Rumanoj ne entreprenos organizi ĝin. Sed la 2-a DEK – plej bedaŭrinde – jam ne okazis.

En tiu ĉi jaro SES havis 548 regulajn kaj 117 junularajn, do entute 665 membrojn.

La sekva jaro – 1949 – signifas plifortiĝon de SES kaj de la tuta movado. SES fariĝas partnero al la movado en la ĉeĥaj landoj. En la respubliko estas sentata la bezono de reprezenta tutŝtata organo. Tial dum la kongreso en Liberec (04-06-an de junio 1949) estas atingita interkonsento en tiu senco, ke la ĝenerala kunveno aldone aprobis la t.n. konvencion de Brno el la jaro 1946; per tio ĝi respektis la faktan staton kaj kreis atmosferon de vera kunlaboro, sen konkurenco, sed en sana vetkonkurado.

En tiu ĉi jaro okazis jam la 3-a sinsekva **Tutslovaka Esperanto-kongreso**. Ĝi okazis en Bratislava en la tagoj 30-a de julio – 1-a de aŭgusto 1949 kun partopreno de 300 gekongresanoj. Dum tiu ĉi kongreso, en la ĝenerala kunveno, estis akceptita la propono de E. V. Tvarožek organizi la terenon laŭ teritoria vidpunkto – kun regionaj, distriktaj kaj lokaj perantoj, kiel estis en la ĉeĥaj landoj.

Estis registritaj oficialaj sukcesoj: la komisiitejo por Informoj kaj klerigo komencis eldonadi multobligitan periodaĵon "Kultura Revuo" (en 350 ekz.), kiu atingis tian eĥon, ke oni plialtigis ĝian eldonkvanton al 1000 ekz. kaj komencis eldonadi ĝin presite. (Bedaŭrinde, en 1951 mortigis ĝin la centralismo de Praha: "Jak to, že to vychází? Ušlo naší pozornosti. Bude se řídit celostátně...") – En Trenčín aperis serio de 90 bildkartoj kun Esperanta teksto. – En la semajna revuo "Nedela" estas E-rubriko (gvidas ĝin s-ano Lamačka). – Aperis turismaj prospektoj en E. pri Bratislava, Štrbské pleso kaj Rajecké Teplice.

En 1949 pliintensiĝis la Kursaj kampanjoj. En la monatoj aŭgusto-septembro gvidas en nord-okcidenta Slovakio plurajn kursojn s-ano Karlo Šolc, dum oktobro instruas en Trenčín Milda Jakubcová.

La sekvo de la pligrandiĝanta intereso pri E. inter la junularo estas la aperado de la multobligata bulteno "Juna voĉo", eldonata en Poprad dank' precipe al fervoraj junaj ges-anoj Milan Zvara, Neitus Lipták, Ján Slivka, Mira Finková kaj Milan Neubeler.

En Septembro 1949 okazas la 2-a regiona kunveno en Nové Mesto nad Váhom.

Grava evento de la jaro estis la apero de "Velká slovenská učebnica esperanta" de Ján Valaš'an-Dolinský, eldonita fare de Slovakotour en Trenčín. Ĝi, la vortaro de la sama aŭtoro (aperinta en 1948) kaj la du lernolibretoj menciitaj kunlige kun la jaro 1947, Slovaka E-Societo, Esperantisto Slovaka kaj Slovaka E-Instituto reprezentis jam solidan bazon por ekesto kaj disvastiĝo de vera movado en Slovakio.

La 1-an de majo mortis prof. Vlado Jukl, vicprezidanto de SES kaj prezidanto de la Ekzamena komisiono; la 27-an de nov. mortis en Bardejov D-ro Vilhelmo Austerlitz.

La jaro 1950 signifas pluan kreskon de la junularaj fortoj laŭ nombro kaj kvalito. – Fondiĝis novaj rondetoj: en Svit, Kežmarok, Lipt. Hrádok, Galanta (junulara), Púchov, Vrútky, Žilina (Slovena).

La 21-an de majo okazas regiona kunveno en Trenčín, okaze de kiu estas en la Distrikta muzeo inaŭgurita Esperanto-muzeo kaj fondita E-rondeto en la fabriko Merina. – La 25-an de junio okazis regiona kunveno en Trnava kaj la 20-an de aŭg. en Veselí nad Moravou laborkunveno de esp-istoj el la moravia-slovakia limregiono, la 8-an de okt. regiona kunveno en Vrútky.

En 1950 de okazis speciala slovakia E-kongreso, sed SSS havis sian **IV-an ĝeneralan kunvenon** en le kadro de la 8-a ĉsl. E-kongreso en Brno (la 27-an ĝis 29-an de majo). Partoprenis en ĝi 120 kongresanoj el Slovakio. Estis diskutata la funkciado de la teritorpa divido (la sistemo de perantoj). Pri SES estis konstatite, ke monon ĝi ne havas, tamen la movado en Slovakio floras kaj kreskas dank' al siaj pioniroj kaj al la helpo s-anoj ĉeĥaj kaj moraviaj.

En tiu ĉi jaro specialan akcelon ricevis la publika instruado de Esperanto. Denove havis kursojn s-ano Karlo Šolc, precipe sur la teritorio de Turiec kaj en la Váh-valo. En Púchov denove instruis s-anino Milda Jakubcová, en Kežmarok kaj Levoča d-ro E. Sahliger. Kiel filio de la Somera E-Kolegio en Doksy estis de la 5-a ĝis la 19-a de aŭg. 1950 okazigita en Svit Somera E-Kolegio por Slovakio, en kies kursoj partoprenis 180 personoj. Kvankam granda parto el ili estis el ĉeĥaj landoj, tamen la influo de la kolegio al la slovakia ĝenerala publiko estis konsiderinda.

Interne la movado plisimpliĝas kaj farigas ĉiam pli unueca. Ankaŭ le bulteno de SES, la "Informoj de SES" ne plu aperas aparte, sed sur la kovrilpaĝoj de Esperantisto slovaka kiel ĝia organiza parto.

En 1950 okazis sume 20 publikaj kursoj, ĉefe merite de K. Šolc. Estis fonditaj 12 lokaj grupoj de SES kaj 2 gimnaziaj studrondoj. En la anaro estis ioma malkresko (578 anoj) pro la eksigo de la nepagintoj. Esperantisto Slovaka fariĝis altnivela revueto kaj laŭ enhavo kaj laŭ aspekto, ŝatata tra la tuta respubliko kaj bone konata ankaŭ eksterlande – praktike sur ĉiuj kontinentoj. Precipe la duobla jarfina kajero 1950 kun 80-bilda aldono pri grotoj vekis merititan admiron tutmonde.

La jaro 1951 signifas la komecon de la fino de la belega laboro. Jam en marto estis videble, ke sur la verda firmamento aperas nuboj. La nova leĝo pri la societa vivo kaj la deviga transiro de ĉiuj societoj al amas-organizoj, precipe al la Revolucia sindikata movado, kun kiu AEĈSR traktis pri aliĝo (tiel, ke la E-klubo fariĝus partoj de Entreprenaj kluboj en la entreprenoj de siaj urboj), multe komplikis la situacion.

Malgraŭ ĉiuj nuboj la verda popoleto daŭrigis sian laboron. La 1-an de julio 1951 okazis en Martin la 2-a Regiona kunveno de la regiono Žilina, la 26-an de aŭg. la regiona kunveno de la Subtatra regiono en Lipt. Sv. Mikuláš, kaj la 20-21-an de okt. 1951 la Slovaka junulara kunveno en Svit; ĝi elektis la bultenon "Juna voĉo" oficiala organo de la slovakia E-junularo.

Aperis nova eldono de la slovaklingva Ŝlosilo de Esperanto (fare de Slovakotour en Košice kaj merite de s-ano A. D. Kremer.)

Sed venis la unuaj batoj: la Kultura Revuo, jam dusemajna kaj presata, estis ĉesigita, kaj la E-muzeo en Trenčín likvidita. La semajna gazeto "Nedeľa" ĉesis aperigadi la rubrikon "Samideano" de s-ano Lamačka.

Ankaŭ en 1951 ne okazis slovakia E-kongreso, sed la 5-a jarkunveno de SES okazis en Praha la 17an de junio en la kadro de la ĝenerala kunveno de EAĈSR.

La tuta movado suferis pro la ŝanĝoj en la strukturo de la societa vivo. SES laŭleĝe estis la centro por esperantistoj kaj ĉiu devis esti ĝia membro, eĉ se lia rondeto aligis al iu entreprena klubo. Tiu ĉi du-releco kreis ege komplika la situacion, kiu fine gvidis al la formorto de la asociaj centroj. Granda – kaj ŝajnas, ke la decida – bato estis la fakto, ke ne plu povis aperadi Esperantisto slovakia. Ne, oni ne malpermesis ĝin – oni simple ne donis al ĝi la bezonan kvoton da papero. En la novembra n-ro jam estis pri tio informo kaj en la decembra n-ro aperis tiu ĉi "Adiaŭa saluto" de la redakcio kaj administracio de ES:

Adiaŭ, karaj abonantoj,
la lasta estas ĉi-numer'.
Adiaŭ, karaj gelegantoj,
en ĉiu laŭdistanca sfer'.

Funebros nia la humoro,
sur la vizaĝ' mortis la rid',
sed tamen esperĝem' en koro
mallaŭte sonas: Ĝis revid'!

La situacio de la movado en Slovakio estis praktike la sama kiel en ĉeĥaj landoj. Post la formala likvido de AEĈSR – do ankaŭ ĈAE kaj SES – la 6-an de dec. 1952, restis praktike nenia centro por esperantistoj kaj esperantistaj rondetoj. Sen organiza centro kaj sen presorgano, la rondetoj aliĝis al la sindikataj entreprenaj kluboj kaj al Domoj de kulturo, aŭ ĉesis ekzisti. La organizita movado estis disbatita, diserigita en siajn elementajn partojn, kies sorto nun dependis plene de ilia propra vivkapablo kaj de la sinteno de iliaj patronoj.

Granda parto de la rondetoj montriĝis vivkapabla kaj ekzistis plu, kelkaj post la transira periodo reviviĝis, ja eĉ eldonadis multobligitajn bultenojn – ne nur por siaj membroj, sed ankaŭ por izoluloj en sia ĉirkaŭaĵo, ja eĉ pli malproksime.

La signalo, ke tamen ia larĝskala kaj centre organizita laboro estos ebla, estis la fondo de Mondpaca Esperanto-Movado kaj de ĝia organo Paco. Sed la plej grava estas la fakto, ke en 1955 ekestis vigla interesiĝo pri Esperanto en Sovetio. Ĝi estis jam post la morto de Stalin kaj post la revizio de liaj tezoj pri lingva problemoj kaj pri la kosmopolitismo. Kelkaj eminentaj scienculoj elpaŝis eĉ publike, eklaboris propagande kaj eĉ organize, kaj trovis tre favoran sintenon ĉe diversaj instancoj. Precipe eminentiĝis en tiu ĉi laboro D-ro Eŭgeno Bokarev, partopreninto de la 1-a Konferenco de ĉsl. esperantistoj pacbatalantoj en Otrokovice.

Tiu ĉi sinteno de la sovetiaj influriĉaj rondoj, favoraj komentoj pri Esperanto en la Granda sovetia enciklopedio, favora rezolucio de UNESCO pri Esperanto kaj ĉesigo de la asertoj, ke Esperanto estas apriorie afero kosmopolita, kreis atmosferon pli favoran por Esperanto en Sovetio, kaj popoldemokrataj landoj, do ankaŭ ĉe ni.

Por kontraŭbatali tion, kio plej multe malutilis al nia afero – la disbatitecon de la movado en aron da izolaj, nekunlaborantaj rondetoj, la delegitoj de la Esperanto-rondetoj ĉe Entreprenaj kluboj kaj ĉe Domoj de kulturo, kunvenintaj en 1954 en Olomouc fondis provizore kaj en 1955 en Otrokovice definitive la Tutŝtatan konsultan komitaton esperantistan (TKKE), kiu ne estis asocio, sed senstatuta komitato, kies celo estis helpi la agadon de la izolitaj lokaj rondetoj kunordigi ĝin laŭ

landa skalo kaj reprezentanti la E-rondetojn antaŭ la oficoj kaj publiko. TKKE havis ankaŭ slovakan sekcion, kies gvidanto estis Eduard V. Tvarožek, estante samtempe vicprezidanto de TKKE.

Pri TKKE vidu pli detale en la kontribuaĵoj de s-anoj Sviták kaj Mařík.

Estas karakterize, ke post la nuligo de la Asocio la agado pluvivis precipe en la provincaj urboj kaj urbetoj. En Slovakio la gvidan rolon transprenis Martin. La rondeto post diversaj malfavoraj cirkonstancoj ĉe la Entreprena klubo Stalinovec transiris al la Domo de kulturo kaj tie, ĝuante relativan trankvilon, ĝi eklaboris pli vastskale.

En januaro 1957 aperis eĉ multobligata bulteno "Esperanto en Slovakio", kiu arigis ĉirkaŭ si valorajn kunlaborantojn kaj baldaŭ fariĝis grava ligilo inter rondetoj kaj unuopuloj, organizanto, instiganto, viviganto. Jam en la unua n-ro (E. V. Tvarožek kiel gvidanto de) la slovakaj sekcio de TKKE ekagis organize, donante konsilojn por denov estigo de regula movado.

EES aperigadis raportojn pri la progreso de nia afero en Sovetio, donante tiel argumentojn al niaj ges-anoj, instigadis al aliĝo al UEA, kiu denove estis ebla ekde 1957, diskonigis la rezolucion de UNESCO, informadis pri havebla literaturo kaj pri la vivo de aliaj ronetoj. Gravaj estis la informoj pri la progreso de Esperanto en aliaj socialismaj landoj.

Jam la unua n-ro de EES estis bonege akceptita.

La E-rondeto en Martin reeldonis ankaŭ la lernotekstojn "Esperanto v 14. úlohách". La organizita vivo denove komencis pulsi. La 25-an de aŭg. 1957 okazis en Spišská Nová Ves Kunveno de E-rondetoj de la Subtatra regiono. La 29-an de sept. 1957 okazis tre sukcesa regiona kunveno en Žilina.

Tiujn ĉi regionajn kunvenojn la Slovaka sekcio de TKKE konsideris en tiu tempo baza labormaniero.

La 15-an de okt. 1957 okazis en Bratislava ĉe la Kleriga Centro Kunveno de reprezentantoj de Komisiitejo por lernejoj, de la Kleriga Centro kaj de la E-movado en Slovakio; la celo de la kunveno estis ellabori proponon pri fondo de Slovaka E-komitato kaj nomi reprezentantojn de Slovakio en la Tutŝtatan E-Komitaton. Ĝi estis la sekvo de petrsktibo de TKKE, prezentita jam pasintjare al la Ministerio de kulturo.

En la preso denove komencas aperadi informoj pri Esperanto kaj pri la movado.

En sept. 1957 UEA havis en ĈSR 456 membrojn, el tio 62 el Slovakio.

Kiel almetaĵo al la 10-a n-ro de EES estis la cirkulero, ke la Ministerio por lernejoj ĉesigas la funkciadon de TKKE kaj informas, ke estis nomumita Tutŝtata Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, kies presidanto estis dekretita la konata k-do A.Malík. Por Slovakio estis kiel gvida organo elektota Slovaka E-komitato.

En tiu ĉi jaro fondiĝis, refondiĝis, revigliĝis kaj laboris en Slovakio 8 rondetoj. La vivo konsolidiĝas kaj la verdaj vicoj, kvankam iom malkreskintaj laŭnombre, rekonsciiĝas.

E-klubo en Martin rememoris la duoblan jubileon – la 70 jarojn de la lingvo kaj 50 jarojn de la apero de slovakaj E-lernolibroj – per serio de 4 glumarkoj, laŭ projekto de E. V. Tvarožek kaj desegno de J. Andel.

La 16-an de februaro 1958 okazis sukcesa regiona kunveno en Košice.

La 19-an de febr. estis la unua laborkunveno de la 2-a tutŝtata **Ĉeĥoslovaka E-Komitato** (ĈSEK) en la Ministerio por lernejoj en Praha, ĝia anaro fiksita, agadprincipoj difinitaj ... La esperojn de nia verda popolo ĈSEK bedaŭrinde ne plenumis, ja eĉ male. Volante unuece influi la movadon ĉe ni, ĈSEK postulis, ke la lokaj kaj regionaj bultenoj ĉesu aperi. Prete kontribui al la normaligo de la situacio kaj ne malhelpi la promesitan evoluon, la E-K en Martin ĉesigis la aperigadon de "Esperanto en Slovakio", kiu dum la du jaroj de sia ekzisto fariĝis grava ligilo inter la slovakia kaj ankaŭ la ĉeĥa samideanaro, kaj atingis la elnombron de 750 ekz.

Por dece adiaŭ de sia legataro, EES eldonis kun sia lasta numero n-ro de 1958 literaturan "Almanaketon" kun originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj de slovakaj E-aŭtoroj. La Almanaketo malgraŭ sia modesta aspekto trovis tre favoran akcepton eĉ ĉe eksterlandaj recenzintoj.

Dum la jaro 1959 la slovakia movado estas sen sia propra informa organo. La sola periodaĵo estas Zprávy de ĈSEK. Certa nombro de esperantistoj malaktiviĝis, sed la tereno malgraŭ la retiriĝintoj plu viglis. Atestas pri tio ankaŭ la fakto, ke en 1959 la s-anoj el Žilina okazigis regionan kunvenon en Rajecké Teplice, tre sukcesintan, kaj tial ĝi estis ripetita en septembro 1960 kun la partopreno de ĈSEK, kiu tien kunvokis sian plenkunsidon. Pri ĝi raportis la 2-a n-ro de la bulteno "Esperanto en slovakaj regionoj"; ĝi estis la iama Esperanto en Slovakio, kiun la E-K en Martin rekomencis eldonadi, ĉar el ĉiuj bultenoj ĉesis post la alvoko de ĈSEK aperadi ĝuste nur tiu Esperanto en Slovakio, unu el la plej bezonataj.

Tiutempe ankaŭ la E-klubo en Bratislava komencis eldonadi bultenon, de kiu, bedaŭrinde aperis nur 6 n-roj.

Ŝajnis, ke ankaŭ oficiale estos atingeblaj iaj progresoj, precipe sur tiu kampo, kie oni sentis la plej grandajn mankojn. Oni vidis, ke ĈSEK propagandas servadon pere de E. al diversaj celoj, kaj kunlaboroj kun diversaj instancoj, sed ne zorgas pri la disvastigo de la lingvo kaj pri akiro de novaj adeptoj. Tial ekestis la ideo renovigi la tradicion de Someraj E-kolegioj, kaj la klubo de Bratislava estis komisiita de la Ministerio por lernejoj organizi en la tagoj de la 13-a ĝis la 26-a de aŭg. 1961 Someran E-Kolegion en Trenč. Teplice, en la Hejmo de la kanthoro de slovakaj geinstruistoj. Estis komencita propagando kaj ŝajnis, ke Bratislava regajnos sian iaman gvidan lokon en la slovakia movado.

Dum 1960 estis konstatebla radikala ŝanĝo en la sinteno de la slovakia gazetaro – favore al Esperanto! – ne nur ĉe la tagaj ĵurnaloj, sed ankaŭ ĉe la fakaj kaj popularsciencaj periodaĵoj, kaj pri la problemo de internacia lingvo okupiĝas seriozaj sciencistoj, esprimante sin favore al Esperanto.

En 1961 la atento de la slovakiaj esp-istoj estis turnita tute al Trenč. Teplice, kie estis inter la 13-a kaj 26-a ĉe aŭgusto okazonta Somera E-kolegio. Al ĝi estis aliĝintaj 130 gekursanoj, sed nekomprenebla burokratio de la reprezentantino de la ministerio de kulturo malhelpis ĝin kelkajn tagojn antaŭ ĝia komenciĝo. Tiu ĉi interveno de la Ministerio tute sen-emigis la ges-anojn en Bratislava, paralizis tute la vivon tie kaj ege malfavore influis la movadon tra la tuta ŝtato kaj kaŭzis – kune kun la ĝenerala situacio – stagnon kaj forvelkadon de la aktiveco en nombraj rondetoj.

Tamen la gvidantoj de la movado kaj vivigantoj de la verda spirito – precipe helpe de la bulteno "Esperanto" aperanta en Martin klopodis vivteni la batal- kaj labormoralon ĉe la verda popolo, krom aliaj antaŭ ĉio per renkontiĝoj (30-an de junio – 01-an de julio 1962 en Turčianske Teplice). La bulteno aperigadis novaĵojn el la esperantista vivo en socialismaj landoj, donadis argumentojn al la aktivuloj batalantaj kontraŭ malfavore kaj malbonvolo de diversaj lokaj Napoleonoj, ofte misuzantaj sian funkcion en la publika vivo. Rondetoj fondiĝas, reviviĝas – kaj formortas. Kaj la premo jungi la rondetojn en laborojn ekstermovadajn, igi ilin labori ĉiam pli kaj pli nur per-Esperante, kreskas. Kaj la ĉielo denove nubigis.

En Bratislava subite ĉesas la aktiveco. Vivas iuj rondetoj en provincaj urboj kaj urbetoj, kaj obstine laboras Martin. Por praktike kulturi la slovakon-ĉeĥan fratecon kaj por pli firman bazon al siaj laboroj kaj ekzisto, la rondetoj en Martin kaj Jihlava ĝemeliĝas. Martin denove ĉesas eldonadi sian bultenon kaj anstataŭ ĝi la abonintoj ricevas la neregulan kluban bultenon "Agado" de la klubo el Jihlava. La kunlaboro startas laŭplane kaj daŭras du jarojn; "Agado" aperas sufiĉe neregule (1963: 5 foje, 1964: 3 foje), sed klopodas respeguli ne nur la vivon en la du rondetoj, sed alportas sciigon ankaŭ el aliaj E-rondetoj en Slovakio, ankoraŭ vivantaj. Sed la kunordiga-gvida funkcio de Martin forte malkreskas sen propra periodaĵo. Tamen la ĉirkaŭaĵon ĝi influas forte kaj okazigas 2 renkontiĝojn – en majo 1964 en Turč. Teplice kaj en septembro 1964 en Žilina. Ambaŭ refortigis la spiriton da la ĉeestintoj, enkalkulite la Jihlavanojn.

En tiu ĉi jaro aperas dank' al la klopodoj de Jihlavanoj presite la nova lernolibreto de

Vladimír Gazda "Základy mezinárodního jazyka esperanto" kaj ĉe Slovaka teatra kaj literatura agentejo DILIZA multobligite la unua traduko de komplete literatura verko slovaka "Meteoro", teatraĵo de Peter Karvaš en la traduko de V. Gazda. Ambaŭ eldonaĵoj estas gravaj en la ekzistanta situacio kaj signifas kaj helpon al la movado, kaj moralan argumenton.

Sed fine de 1964 subite venis el Jihlava informo, ke tie – pro ies interveno – tute ĉesis la Esperantista aktiveco kaj do Martin devas repreni la batalon denove sola. La klubo – nun jam ĉe la Entreprena klubo de la Maŝinfabrika de Turiec (Turčianske strojárne) daŭrigas la eldonadon de "Agado" kiel regula 2-monata bulteno por Slovakio, kun specialaj propagandaj paĝoj por neesperantistoj.

Komence de 1965 fondas D-ro Nekuda rondeton en Piesok, meze de aŭgusto okazas sukcesa renkontiĝo en Zvolen kaj en septembro ariĝas en Dudince 137 esperantistoj okaze de tie aranĝita renkontiĝo, organizita tie fare de s-ano E. Váňa.

Pri vigla aktiveco raportas Martin kaj Košice.

Du gravegaj verkoj aperis en 1965:

1. La lernolibro "Učebnica esperanta" de D-ro Fr. Šatura kaj Paŭlo Rosa – 221 23 paĝa, ĝis nun la plej granda slovakingva lernolibro de Esperanto, enhavanta krom 20 studlecioj ankaŭ resumon de la Esperanta gramatiko, historion de la ideo de la internacia lingvo, trarigardon de la Esperanto-literaturo kaj bazan Esperantan-slovakon vortaron.

2. "Rozprávate po esperantsky? – Ĉu vi parolas Esperante?" – konversacia libro de D-rino Magda Šaturová. Ambaŭ verkoj aperis en la Slovaka pedagogia eldonejo en Bratislava.

Bedaŭrinde, en oktobro de tiu ĉi jaro mortas la nestoro de slovakaĵoj esperantistoj. Lia muzikkomponista kaj literatura – ankaŭ Esperanta – postlasaĵo estas en prizorgo de la literatara arkivo de Matica slovenská en Martin.

Sed la vivo pulsas plu. Komence de 1966 fondiĝas rondeto en Piešťany kaj en la maja renkontiĝo en Altaj Tatroj kunvenas 96 esperantistoj, inter ili 17 Poloj kaj 6 Hungaroj. En ĝia kadro okazas plenkunsido de ĈSEK. En tiu ĉi jaro reviviĝas ankaŭ la rondeto en Prievidza.

En septembro 1966 kunvenas en Dudince en la 2-a amika renkontiĝo denove proksimume 130 gesamideanoj, inter ili 13 eksterlandanoj.

Aperas ankaŭ novaj laborformoj: E-K en Lipt. Mikuláš uzas la disktriktan perdratan disaŭdigon por la disvastigo de siaj pri-Esperantaj informoj. – En la katedro de lingvoj de la universitato en Bratislava estas starigita lektorato de Esperanto (lektorino D-rino Magda Šaturová).

Granda instigo por la movado estas sukceso kaj granda reeĥo de la 51-a UK en Budepeŝt, kiun vizitis ankaŭ centoj da ĉeĥoslovakiaĵoj ges-anoj.

En Prievisa okazas sukcesa renkontiĝo.

"Pionierske noviny" aperigas ĉiu-semajne E-rubrikon (gvidas J. Lamačka).

La 19-20-an de aŭg. 1967 okazas tutslovakia E.konferenco en Bratislava kun granda eĥo en la gazetaro kaj en la radio.

Ekde septembro 1967 komencis aperadi Esperanto-kurso en la regiona tagĵurnalo "Smer" (E. Váňa) kaj ekde novembro en "Smena" (P. Rosa). Ekde novembro aperas en la monata revuo por amatoraj teatristoj "Umelecké slovo", alinomita en 1969 je "Javisko", pri-literatura E-paĝo (E. V. Tvarožek). – En la radio la programo "Radar" elsendadas informojn pri E. kaj ekde la nova jaro 1968 E-kurson.

Dank' al la klopodoj de E-K en Martin aperas nova, korektita (fotografita) eldono de "Základy mezinárodního jazyka esperanto".

La jaro 1968:

La 26-an de febr. 1968 estis oficiale konstituita la Konsulta Komitato ĉe la Kleriga Instituto en Bratislava. Poste – sub la interkonsento kun la Instituto kiel eldonanto – estigo de E-paĝo en la dusemajna revuo "Nedeľa" (gvid. Pavel Rosa).

La 16-17-an de marto 1968 okazis tre sukcesa renkontiĝo en la kabano sur Bezovec, kun la ĉeesto de reprezentanto de la Kleriga Instituto.

La bulteno de la martina E-K "Esperanto-Agado" ekde sia 3-a ĉi-jara n-ro – post 17-jara paŭzo – denove havas la tradician nomon "Esperantisto Slovaka".

La slovakaj teatra kaj literatura agentejoj DILIZA eldonas la teatraĵon de Ján Kákoš "Mohajra plejdo" (Mohárový pléd, en traduko de E. V. Tvarožek).

En la tagoj 17-a – 20-a de julio okazas Piešťany Internacia Esperanto-Somero kun partopreno de 40 personoj (org. la EK ĉe Chirana, Piešťany, kaj J. Lamačka).

La 22-23-an de junio: renkontiĝo de esperantistoj el la Váh-valo en Trienčanské Teplice (en la Hejmo de la Kanthoro de slovakaj instruistoj) – 30 personoj.

La 4-18-an de aŭgusto – Somera Esperanto-Seminario en Prievidza kun 120 personoj en 4 kursoj (A, A₁, B, C).

La situacio en tiu ĉi tempo komencis evolui tre interese. Ni havis neniun centran gvidan organizaĵon. La oficiala ĈSEK estis pli kontrola ol organiza organo kaj havis siajn sufiĉe grandajn problemojn. La cirkonstancoj maturiĝadis ankaŭ en la samsorta ĉirkaŭa mondo kiel ĉe ni. La jaroj 1966-7 ja alportis kvazaŭ ŝtorman evoluon.

Dank' al la persista laboro, informado kaj konvinkigado fare de la malnovaj aktivuloj la movado forte revigliĝis. Subite malfermiĝis la pordoj al ĉiuj amasinformaj medioj. En ĵurnaloj kaj gazetoj aperadis kursoj kaj regulaj rubrikoj, la radio aranĝis kurson, la vasta publiko kaj institucioj ekinteresiĝis pri nia afero. La eraroj de la pasinteco estis forigataj kaj subite aperis en la perspektivo la ebleco fondi nian propran asocion.

La Kleriga Instituto en Bratislava fariĝis sendepeda de la KI en Praha kaj en aŭtuno 1967, kreis konsilantaron por Esperanto kaj E-rondetoj, kiu estis konstituita oficiale la 16-an de febr. 1968. La konsilantaro komence havis taskon kiel ĈSEK, sed kiam ĈSEK ellaboris kaj prezentis al la Ministerio de kulturo proponon de statuto por Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio, tiam ankaŭ la Konsilantaro eklaboris ĉi-direkte kaj preparis statutproponon por Asocio de esperantistoj en Slovakio.

Ĉar inter la du statutproponoj estis principaj diferencoj en la koncepto – la ĉeĥa eliris el la tiama stato, dum la slovakaj kalkulis pri la evoluo en la estonta neevitebla ŝtat-politika organizo de la respubliko, estis kunvokita kunveno de ĈSEK kaj de la Konsilantaro komune al Brno en la tagoj la 17-13-an de majo 1968. Tie ĉi estis klare difinita la plua procedo: en ĈSSR estos du naciaj Esperanto-organizaĵoj: Ĉeĥa E-Asocio kaj Asocio de esperantistoj en SSR, kaj super ili staros Ĉeĥoslovaka E-Federacio.

La ĉeĥaj membroj de ĈSEK pridiskutis la statutproponon de ĈEA, la slovakaj membroj de ĈSEK kun la membroj de la Konsilantaro la statutproponon por la AESSR kaj kune ili poste pridiskutis statutproponon por la Tegmenta Federacio. La situacio ŝajnis esti tiel favora, ke oni antaŭvidis la fondon de ĉiuj organizaĵoj jam en la unua duono de oktobro 1968, kaj la oferemaj Brnanoj deklaris sin pretaj organizi la laborojn por okazigi tiun ĉi gravan tutŝtatan renkontiĝon.

Sed okazis ŝanĝoj. Pro la daŭra prokrastigado de la aprobo de la nova pri-societa leĝo prokrastiĝis ankaŭ la aprobo de la unuopaj statutproponoj, el kiuj elfalis la partoj pri la federacio. La ministerioj – jam aparte la ĉeĥa kaj la slovakaj, en cirkonstancoj de federacio – aprobis la statutproponojn nur komence de 1969. Kaj sekve do la Ĉeĥa Esperanto-Asocio estis fondita la -an de aprilo en Brno, la Asocio de esperantistoj en Slovaka socialisma respubliko la -an de majo 1969

en Pribylina.

Tie ĉi mi finas mian skizon/. La pluaj okazintaĵoj estas ankoraŭ tro freŝaj kaj mi konsideras rekomendinde atendi kun ilia vicigo ksj pritakso. Samtempe mi esperas, ke la pluan kronikadon faros iu pli kompetenta historiisto, ĉar mi kompilis tiun ĉi skizon simple pro bezono kaj neceso. Tial ĝi povas esti nek kompleta, nek ĉiam ĝusta kaj justa, kaj ĝi antaŭ ĉio – precipe el la vidpunkto de Slovakoj – estas mankanta, ne sufiĉe detala, ĉar en la slovakiaj cirkonstancoj multaj ŝajne bagatelaj detaloj havas pli grandan signifon ol unuavide ŝajnus.

Tial por la slovakiaj esperantistoj tiu ĉi skizo estas antaŭ ĉio provoko kaj instigo: provoko studi ĝin, malkovri ĝiajn mankojn kaj en la formo ĉu de alplenigaj notoj, ĉu de sintezaj studoj korekti tion, kion mi ĉi tie ne tute kontentige prezentis; kaj instigo al zorga kolektado, klasifikado kaj studado de plej diversaj materialoj koncernantaj la Esperanto-movadon en ilia loko kaj ĉirkaŭaĵo kaj ilia prilaboro en sintezaj studoj de la Esperanto-movado en diversaj lokoj kaj regionoj, aperigitaj en Esperantisto Slovaka aŭ aparte, en kiuj ili plej bone povos krei ĝustajn bildojn pri la realeco kaj kiuj siaflanke estu la elirmaterialo por la nova, multe pli kompleta historio de nia movado en Slovakio.